



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 4-a de Septembro 2017

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Asaf Ĥefec, Eran Vodevoz, Matida Landaŭ, Dror Gaon, Eldad Salzman, Gabi Zeevi. **Gastoj:** Doron, Lea, Joela, Miĥal

*Protokolo de la antaŭa kunsido (3-a de Julio 2017) – dissendita al la estraranoj.*

### **Raportoj:**

#### **a) *Israelo dum la UK en Seŭlo:***

- i- ELI-tablo en la Movada Foiro, informado pri la IK – multaj informiloj estis disdonitaj. Amri preparis, printis kaj disdonis en Seŭlo 200 A5-paĝajn informilojn pri la IK 2019 en Eilat /MONA en Akaba, kaj aliflanke pri la IK 2018 en Akko. Disdonis dum la Movada Foiro, dum la kunveno de KAEM (azia agado) kaj multe persone. Estis granda interesiĝo.
- ii- Vendado de diversaj varoj. Amri printigis 20 pliajn ekz. de la Memolibro de Josi, kiu jam elĉerpiĝis. Kunportis 12 al Seŭlo, - ĉiuj venditaj (kelkaj al UEA), vendoprezio 18 eŭroj, ELI ricevis 12 eŭrojn por ekzemplero.
- iii- Amri presigis 50 "dryfit" ĉemizojn laŭ la "Zamenhof-jaro" dezajno de Jael fronte, dorse E-en Israelo, dezajno de Amri. Ĉ. 10 estis venditaj en la Libroservo en Seŭlo (12 eŭroj). Vendoprezio en Israelo: 50 NIS. Pro manko en la presejo - ĉiuj blankaj.
- iv- Reprezentado de ELI en KAEM (raporto pri aktivado), Komitato, propagando por Israelo
- b) Sciigoj kaj fotoj pri la libro-foiro kaj la inaŭguro de la memortabulo "Patro Nia" aperis en la rubriko "Kalejdoskop" de la Septembra n-ro de Esperanto (Amri)
- c) "Olivestone Trust" volas okazigi aranĝon okaze de la Z-Jaro (Jehoŝua): iu mecenatino volas apogi, ŝi volas aranĝi kun famuloj. Ili rekontaktos nin en septembro.
- ĉ) Zamenhofa vespero: rezervita la granda salono por 11.12. (Jehoŝua)
- d) Amri aprobis nome de ELI la kontrakton inter Ŝoŝia kaj ŝia agento Ofer, pri distribuo de ŝia E-KD. Li rajtos distribui tutmonde, sed ELI povos pli vendi en E-aranĝoj kaj en Israelo.
- e) Dratwerejo: Jehoŝua raportos venontfoje.
- f) Lea petas: la venontan fojon ni devos diskuti pri la kontrol-komitato!

#### **1. 19-a Israela Kongreso, Akko, 2018 (Amri) 3-5/05/2018**

- a) Gastartistoj: Ĵomart kaj Nataŝa (konfirmita) Flugbiletoj + hotelo por 2 noktoj kun manĝado – ĉ. 1400 \$. *Voĉdono: plimulto!*
- b) Tabelo de ĉiuj kotizoj aperas en la retejo <http://esperanto.org.il/ik.html>
- c) Prezo por eksterlandano estu 150 eŭroj. (Israelanoj: 576 NIS por persono).
- ĉ) La programkosto por israelanoj estu 100 NIS, altiĝos en 2018. – *unanime aprobata!*

2/...



## 2. Israela Kongreso, Eilat/Akaba, 20-a IK+MONA 2019 (Amri)

- a) Amri invitis al ĝi en la saluto de Israelo dum la inaŭguro kaj KAEM-kunveno en Seŭlo  
 b) Pluraj potencialaj partoprenantoj diris ke ili povos nur pli proksime al la paskaj ferioj, sekve ni ŝanĝu la datojn al **11-13/04/2019** (la juda pasko estas 19/4, la kristana 21/4)  
 – *unuanime aprobita!*  
 c) Gast-artistoj: Kajto (*rete konfirmita*)

## 3. Financaj petoj (Amri)

- a) MONA (Renato) petas helpon de ELI reklami E-on en Jordanio, la eventojn en 2019.  
 Diskuto: 100 aŭ 50 eŭroj? *Rezolucio*: ELI apogas per 50 eŭroj (*akceptita per la plimulto!*)  
 b) La Jerusalema E-klubo petas subtenon por la klubejo, 150 NIS monate. Ĉ.10 esperantistoj.  
 Laurin Lewis povos aranĝi ĉe si, sed li loĝas en malfacile atingebla loko. Ĉu en la Rusa Biblioteko? *Voĉdono kaj unuanima decido*: ELI apogos, kondiĉe ke ili daŭre provu trovi senpagan eblecon!  
 c) FEL petas repagon de la libroj prenitaj komisie en 2008, do, antaŭ 9 jaroj. Eble ili estas en la kelo de Doron – sed nia devo estus fine pagi por ili. (155 eŭroj).  
*Voĉdono*: pagi! (*plimulto*)

## 4. Novaj Facebook-kontaktoj kun palestinaj/arabaj E-istoj (Amri)

- Monir (Jerusalemo/Bet Lehem) jam vizitis la klubon, lernas ĉe Miklaf (Amri kontaktigis ilin)  
 Samer - skribas E-on bone, memlerninto per Duolingo, loĝas en Bet Saĥur  
 Alaa - jordania e-istino, E-aktiva en FB – amikiĝis kun Amri en FB.

## 5. Esperanto kurso en Tel Avivo (Doron)

- a) Reklamado, buĝeto, kunordiganto – Joela: ne eblas reklami antaŭ ol ni scias la detalojn!  
 Komisiono por reklamado: ĉefo: Doron, anoj: Dror, Eran. Komenca buĝeto: 5000 sikloj.  
*Voĉdono*: 7 por (*la plimulto*)  
 b) Loko: Ĉu WIZO post la klubo? Kio okazos okaze de estrarkunsido? Joela: ne certe, ke Efrati akceptos, sed ŝi daŭrigos konvinki lin, eble li volos aldonan pagon.  
 La plej favorata ebleco estas en la kela klasĉambro, de 18-19h.  
*Voĉdono*: Joela daŭrigu la kontakton kun li, ŝi havas la rajton negoci (*unuanime!*)  
 c) Kondiĉoj: rekompenco por la instruisto - 7000 NIS por 20 renkontiĝoj. Minimuma nombro de gelernantoj: 6. *Voĉdono*: *unuanime!*

## 6. Financoj: pagoj al funkciuloj, 1/4-jara raporto prokrastita al la venonta kunsido

**La venonta kunsido:** lunde, la 2-an de Oktobro 2017, je 19:45

Protokolis: Gabi Zeevi